4.ª JARO - N.º 2 JUNIO, 1912

# Brazila Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE
**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA**
Elirante ĉiumonate — Apparecendo mensalmente
**REDAKCIO—AVENIDA RIO BRANCO 153, 2.º**
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

B. L. E.

Honora Prezidanto—*Inĝ.º Everardo Backheuser*
Prezidanto—*Inĝ.º Alberto Couto Fernandes*
Vicprezidanto—*D-ro João Keating*
1ª Sekretario- *D-ro João B. Mello Souza*
2ª Sekretario - *Hernani da Motta Mendes*
Kasisto—*Edmundo Felix Tribouillet*

## ENHAVO

Brazila Ligo Esperantista.—VIII Congresso Internacional de Esperanto.—1ª Esperantia Brazila Kongreso.—La deveno de la verda stelo.—Esperanto - Kolonio.— Meu coração.— Ridetas Sun'!...— Himno al la mallaboremo.—Diversaĵoj.—Gravega alvoko.— Nekrologio.—Nia konkurso.—Kio estas mateo?—Kroniko.—O Esperanto no estrangeiro.—Novaj gazetoj ricevitaj—. Bibliografio.—Oficiala Gazeto Esperantista.—Grupoj esperantistaj.— Brazila Ligo Esperantista.— Korespondado.—Anoncoj.

**Rio de Janeiro - Brazilio**

## GRUPOJ ESPERANTISTAJ

1906 – Marto — **"Suda Stelaro".** Campinas—Ŝtato S. Paulo.— Prez. Ingº Tobias R Leite.

Junio **Brazila Klubo "Esperanto".** —Avenida Rio Branco, 153, 2º andar, Rio de Janeiro.—Prez. Kolonelo Dr. Moreira Guimarães.

1908—Majo — **Esperanta Petropolisa Grupo** — Petropolis.

Septembro — **Esperanta Klubo** — Aracajú - Ŝtato Sergipe.—Prez. D-ro Alcibiades Corrêa Paes.

1908—Marto—**G. E. de Bom Jardim.**—Ŝtato Rio. —Prez. João Alfredo Desiderio Combat.

Junio— **Brazila Espero** —(Virina grupo) —Campinas. Ŝtato S. Paulo.—Prez. F-no Julia Moreira Dias.

1909—Marto — **Esperantistinaro.**—Guaratinguetá.—Ŝtato S. Paulo.—Prez. S-ino Maria Antonietta Milliet.

Julio—**Norda Matena Stelo.**—Tamoyos n. 41 B. Belem. Ŝtato Pará.—Prez. Anna Sarah de Mattos.

1910—Julio — **Grupo Esperantista de Juiz de Fóra.** — Juiz de Fóra. Ŝtato Minas Geraes. Prez. Paulino Bandeira.

Septembro **Esperantista Grupo Hernani Mendes.** S. José dos Campos.—Prez. Cassiano R Leite.

Novembro — **Esperantia Grupo de Bahia.** Ŝtato Bahia.—Prez. Kolonelo Deraldo Dias.

1911 — Januaro. — **Societo Esperantista Doktoro Baena.**—Belém. Ŝtato Pará. —Prez. Dr. João Pedro de Figueiredo.

**Grupo Esperantista de Parahyba do Norte.** - Prez. Aladio Amaral.

Aŭgusto — **Samideaninaro.**— Aracajú—Ŝtato Sergipe.—Prez-ino Sylvia de Oliveira Ribeiro.

---

Ni publikigas nur la nomojn de l'grupoj kiuj aliĝis al **Brazila Ligo Esperantista** aŭ helpis **Brazilan Esperantiston.**

## BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

UNUIĜO KREAS FORTON

A Brazila Ligo Esperantista (Liga Esperantista Brazileira) cuja directoria é annualmente eleita pelo Congresso tem por fim dirigir a propaganda do Esperanto no Brazil em questões de interesse geral, proceder a exames de Esperanto, dar diplomas de professores, auxiliar os grupos e representar em qualquer emergencia a opinião dos esperantistas brazileiros.

Sede — Rio de Janeiro.

Cotisação annual. Cada grupo que adherir paga 10$000 por anno e elege um delegado, de preferencia residente no Rio de Janeiro. Pode o Grupo escolher mais de um delegado, pagando nessa hypothese, 10$ por cada um.

Qualquer pessoa póde isoladamente adherir á Liga, pagando a annuidade de 5$. Não ha joia.

Vantagens. Os grupos que adherirem á Liga gozarão das seguintes vantagens:

*a)* Recebem o «Brazila Esperantisto» para os socios com abatimento de 20 % do preço da assignatura annual;

*b)* Por intermedio dos seus delegados são informados das decisões da Directoria da Liga nas quaes tomam parte:

*c)* Gozam de abatimento nas edições da Liga e nas encommendas que por meio della fizerem de quaesquer obras esperantistas;

*d)* Recebem da Liga todo o auxilio que esta lhes puder prestar, em beneficio da propaganda e diffusão do Esperanto;

*e)* Podem publicar no orgão official da Liga informações mensaes sobre o movimento esperantista local.

Nota. – *A Liga não intervem em assumptos referentes á vida interna dos grupos filiados, podendo estes agir livremente de accordo com os fins para que foram creados.*

Das vantagens *c*, *d* e *e* gozam tambem as pessoas que adherirem isoladamente á Liga, as quaes recebem o «Brazila Esperantisto».

As pessoas que desejarem adherir á Liga devem dirigir-se ao Sr. E. Felix Tribouillet, thesoureiro, Avenida Rio Branco 153, 2º andar. O remettente receberá o cartão de membro da Liga, e o «Brazila Esperantisto».

Quanto a adhesão dos grupos e demais informações, dirigir-se ao Sr. J. B. Mello Souza, 1º Secretario.

---

## Brazila Ligo Esperantista

**BOLETIM DE ADHESÃO**

**1912**

*Nome*............................................

*Profissão*....

*Endereço*

*Data e assignatura*

# BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"


*4-a. Jaro* | *Junio — 1912* | *Numero 2*

JARABONO
En Brazilio 3$000
Eksterlande 5 fr. (2 Sm.)

Elirante ĉiumonate — Apparecendo mensalmente
REDAKCIO—AVENIDA RIO BRANCO, 153-2°
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Specimeno 0, fr. 50 (0, Sm. 20)
Num. avulso 300 réis
Helpabono 10$000

## D-RO. BAGGI DE ARAUJO




**La plej malnova brazila esperantisto, mortinta la 7an de Januaro lasta**

## Brazila Ligo Esperantista

Adheriram á Brazila Ligo Esperantista durante o anno de 1911 as seguintes pessoas: Dr. Everardo Backheuser, Dr. João Keating, Engenheiro Alberto Couto Fernandes, J. B. Mello Souza, H. Motta Mendes, E. Felix Tribouillet, Major Lauriano das Trinas, Dr. Reinaldo Geyer, Dr. Tobias Rabello Leite, João Teixeira Sequeira de Magalhães, Murillo Furtado, Rodolpho Teixeira, Lindolpho Cuyabano, Manoel P. Cuyabano, Salvador Pompeu, A. Caetano Coutinho, Aristides P. Paes Campos, Macario de Aguiar, Arthur L. Araujo Primo, Dr. José Azevedo Silveira Sobrinho, M. A. Costa Pinto, Moacyr Caminho e Benjamin Mello.

Para o corrente anno já recebemos a adhesão dos Srs. Everardo Backheuser. João Keating, Couto Fernandes, Mello Souza, Motta Mendes, Edmundo Tribouillet, Lauriano das Trinas, Dr. Tobias Rabello Leite, Honorio Riverelo, João Teixeira de Siqueira Magalhães, Murillo Furtado, Carlos de Souza Cunha, Nestor Cravo, Honorio Leal, Dr. Nuno Baena, Severino de Freitas, Dr. Antonio Carlos de Arruda Beltrão, Dr. José Arthur Boiteux, Alekso Fanzéres, Dr. Venancio da Silva, Dr. Methodio Maranhão, senhorita Julieta Mello Souza, Querino de Oliveira e Manoel Tavares Junior.

---

A Directoria da B. L. E. resolveu prorogar por mais um anno a disposição transitoria do Regulamento dos exames de *profesoro aprobita*, segundo a qual, nas localidades onde não haja professor de esperanto os candidatos poderão prestar exame por correspondencia sujeitando-se a provas especiaes à juizo da mesma Directoria.

---

ATESTO PRI LERNADO. — Continuam a ser distribuidos os *atestoj pri lernado* ás pessoas que já prestaram nos respectivos Grupos o necessario exame elementar de esperanto. Chamamos a attenção das Directorias dos grupos para a conveniencia da expedição desses diplomas, cuja taxa actual é de 1$000, pertencendo a metade dos emolumentos arrecadados ao grupo que promover a realisação dos exames.

# VIII Congresso Internacional de Esperanto

**Cracovia**

Proseguem com grande actividade os preparativos para o VIII Congresso Internacional de Esperanto, a reunir-se em Cracovia, de 11 a 18 de Agosto do corrente anno.

Da 3ª e 4ª circulares já expedidas pela commissão organisadora extrahimos os seguintes topicos:

—O governo austriaco resolveu conceder abatimento nas estradas de ferro nacionaes para os congressistas, uma semana antes e uma semana depois do congresso. Não contente com esse resultado, a commissão trabalha para conseguir maiores vantagens.

—Uma interessante exposição industrial está em preparo, sob a direcção da *Landa Industria Ligo*, cujo presidente, o Sr. Krzazynski pretende fazer conferencias em esperanto, com projecções luminosas.

—A organlsação dos concursos litterarios foi confiada á redacção do «Pola Esperantisto» que resolveu propor apenas tres concursos, com premios em dinheiro. Os themas são:

1º Um trecho em prosa sobre qualquer assumpto: 500 palavras no minimo: com dois premios; de 65 Sm. e 35 Sm.

2º Poesia; 24 versos no minimo. Assumpto á vontade do autor. Dois premios; de 20 e 30 Sm.

3º Dissertação scientifica sobre qualquer assumpto, excepto litteratura e historia. Premios de 65 Sm. e 35 Sm.

Esses premios podem ser proporcionalmente augmentados com offertas posteriores, assim como outros premios podem ser offerecidos. Todas as producções enviadas devem ser originaes e conter apenas o pseudonymo do autor, devendo ir em enveloppe fechado o verdadeiro nome. O prazo fixado para o recebimento dos originaes termina em 15 de junho corrente. Os originaes devem ser remettidos á redacção do *Pola Esperantisto*, Wlodzmierska 8, Varsovia.

A imprensa de Varsovia desde já se manifesta inteiramente favoravel ao esperanto. Varios jornalistas assistem a cursos dessa lingua, afim de redigirem nella suas noticias sobre o congresso, a exemplo do que tem feito seus collegas de outras cidades.

—Será publicado um bellissimo album com os retratos de todos os congressistas. Todo o esperantista, porem, embora não congressista pode, se assim o quizer, ter o retrato no mesmo album, desde que encommende um exemplar. Preço — 5 Sm. A confecção desse album está a cargo do habil artista prof. Gurguel. Os retratos enviados devem ser de *Vizit-formato.*

--Haverá sessões especiaes, officios religiosos, excursões, conferencias, um grande concerto no conservatorio de Cracovia, espectaculos de variedades (em esperanto) no Theatro Novidades: a representção da tragedia Mazeppa, etc., etc.

—A commissão conseguiu de varios excellentes hoteis preços razoaveis para os congressistas. Ha varios preços, conforme o conforto exigido, entre 2 Sm. 75 e 6 Sm. 50 por dia (quarto e comida) ou de 1 Sm. 30 a 3 Sm. para os que desejam apenas quarto.

# 1ª Esperantia Brazila Kongreso

La plej gravaj ĵurnaloj de Rio de Janeiro jam publikigis la provizoran programon de la kongreso, kiu estas jene organizita:

**6 de Julio**—Je la 4ª vespere, prepara kunsido kaj elektado de la estraro de l' kongreso. Je la 8ª, solena malfermo de la 1ª Esperantia Brazila Kongreso.

**7 de Julio** —Je la 9ª matene, meso en Preĝejo Santissimo Sacramento kun kantoj en esperanto al kiu ĉeestos la katólikaj esperantianoj. Je la 11ª, matenmanĝo de la kongresanoj. Je la 2ª vespere, ekskurso. Je la 8ª nokte, labora kunsido.

**8 de Julio** — Je la 1ª vespere, labora kunsido. Je la 8ª, solena ferma kunsido kaj koncerto. Dank'al la afableco kaj sindonemo de nia estimata samideano Dro Boiteux estis al ni permesata de la estraro de Societo de Geografio okazigi la malferman kaj laborajn kunsidojn ĉe la honora salono de tiu Societo.

Je siaj lastaj kunvenoj la Organiza Komitato elektis la presan komitaton, kiu konsistas el Sroj Mello Souza, Motta Mendes kaj Arlindo Souza.

## LA DEVENO DE LA VERDA STELO

De D-ro Zamenhof, al kiu ni skribis por akiri informon por korespondanto, ni ricevis la jenan interesan leteron:

Kara Sinjoro! Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min S-ro Geoghegan kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenca). Pri unu broŝuro, kiun mi tute hazarde aldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis al mi, ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon, ke mi povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de Espero. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko S-ro de Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de la ideoj aperis stelo kun verda koloro.

30-XII-1911 Via L. L. Zamenhof.

*(El La Informanto)*

## Esperanto-Kolonio

S-ro. Mayerhauser, Delegito de U. E. A. en Bad. Reichenhall, proponas fondi en Brazilio specialan *Esperanto-Kolonion*, starigotan laŭ la jenaj principoj:«1. Respublika, resp. demokrata konstitucio de l'kolonio; 2. Egalrajteco por la geanoj de ĉiuj rasoj, religioj, nacioj kaj por ambaŭ seksoj, tiel ke neniu estu preferata aŭ malpreferata pro iu ajn el tiuj kaŭzoj; 3. La sola oficiala lingvo de l'kolonio estu la internacia helpa lingvo Esperanto sur la netuŝebla Zamenhofa fundamento; 4. Senhipoteza scienco». Ĉiuj personoj dezirantaj ricevi la specialan alvokon sin turnu al S-ro. F. Mayerhauser, Bad. Reiĉenhall. (Germanujo).

(El «Esperanto»)

## MEU CORAÇÃO

( L. L. Zamenhof )

Meu coração, não batas agitado.
Não mais te afflija intensa commoção,
Assás já tens soffrido e assás luctado,
Fica tranquillo, humilde coração.

O teu trabalho immenso finda agora,
Eis alcançada a tua aspiração;
Não vencerás na decisiva hora?
Fica tranquillo, altivo coração...

(Do *Correio do Norte*, de Guaratinguetá)

## RIDETAS SUN'!...

Al Dro. A. Couto Fernandes

*Dolĉa Printemp' alvenas,*
*Ekfloras jam herbejo;*
*De l'Homo promenejo*
*Estas la Tero nun!*
*Sur nesto kantas birdoj,*
*Resonas nun l'Aero*
*Ĝojas la tuta Tero,*
*Ridetas Sun'!*

*Kvazaŭ sur nesto, birdoj*
*Kvazaŭ sur grundo, floroj,*
*Ĝuiĝas niaj koroj*
*Kun la Naturo, nun!*
*Vidinte la feliĉon,*
*De la Anim' ravita,*
*Plena je Am' tuŝita,*
*Ridetas Sun'!...*

Magnus Söndahl

## HIMNO AL LA MALLABOREMO

(*De Ferreira de Araujo*)

Ne estis mi, kiu ĝin vokis, kaj ĝi venis. Ĝi alproksimiĝis malrapide, kun lanaj piedoj, sin trenante, prenis mian dekstran manon, kiu eketendiĝas al la plumo, kaj min karesante, paralizis mian brakon.

Poste, kvazaŭ mi estus mordita de serpento, mi sentis ke dolĉa, agrabla senmoveco ekokupis tutan mian korpon, kaj, kvankam la konscienco protestis, kvankam la voĉo de l'devo penadis por esti aŭdata, tamen mi konfesas, ke mi trovis ĉarmojn en la malbono al kiu mi forlasis min.

Ho! ĝuado eltrovita de la dioj, tre bongusta peko, malgraŭ ke oni vin nomas mortanta, estos ja tre agrable morti pro vi, kaj kun vi.

Ĝis la lasta momento, ĝis la fermo de la okuloj al la dormo —kaj certe estas tiamaniere ke oni ekdormas ĉe la lasta dormado, ho peko—la spirito restas libera, ĉe estas la ĝuojn donitajn de vi, kaj estas ilia kunkulpulo. Ĝi vagadas tra' la mondoj, kiujn Dio kreis en la dua semajno, post la ripoza dimanĉo—la fantaziaj mondoj, kie ĉiuj ni konstruos templojn kiuj mortigus de envio la arĥitektistojn de karnak, loĝataj de statuoj, kiuj malsupreniriĝus el siaj piedestaloj tiujn de la grekaj skulptistoj, kaj kies murojn ornamas freskoj kiujn similajn ne pentris la dia Rafaelo.

Kaj en vastaj portikoj, tra salonoj senfinaj kubuttuŝiĝas virinoj kapablaj fermigi la Mahometan paradizon pro manko de klientoj; ili dancadas je l'sono de muziko venanta el nevidebla loko, muziko kiu reaperigus el l'akvoj de lago la miregiten ombron de l' rego Ludoviko, kiu mortis freneza de harmonio.

Mi ne vokis vin, kaj vi venis. Mi volis laboradi, kaj vi delogis min. Nun mi estas tute via; mi vin malamas, sed ne permesas ke vi foriru; via veneno estas tiel dolĉa, tiel apartigita de l' mondo, ke, pro vi, mi forgesas ĉion—la devon, la profiton, la morgaŭon, la presadon, (1) Hastojon (2), por esti nur via, ĝis kiam vi volos min; nur via, dum vi mortigos min de plezuro; nur via, dum vi aliformigos min de kreitaĵo en kreanton; tute via, ho milda, dolĉe kruela, kruele deloganta Mallaboremo!

*Tradukis Kotinju.*

(1) Ferreira de Araujo estis unu el la fondintoj de la grava «Gazeta de Noticias», kaj, ghis sia morto, ghia chefredaktoro.

(2) Hastoy, nomo de l'presisto de la gazeto.

## Diversaĵoj

**Stulta**—Juĝisto—La akuzato al vi promesis recompencon de 25 Spesmiloj se, kiel atestanto, vi farus deklaron favoran al li? Kion li diris? Ripetu kion li diris, uzante liajn proprajn vortojn.

Atestanto: Li diris, ke li donus al mi rekompencon de 25 Sm. se mi atestos...

Juĝisto: Li certe ne parolis tiujn vortojn; li ne nomis sin *li*, kiel oni diras pri tria persono.

Atestanto: Tria persono tute ne ĉeestis!

Juĝisto: Tion mi scias; sed li certe parolis laŭ formo de unua persono.

Atestanto— La unua persono estis mi.

Juĝisto—Vi ne min komprenas. Kiam li parolis al vi, ĉu li ne diris «*Mi donos al vi 25 Sm, se...*

Atestanto—Ne, sinjoro Juĝisto, pri vi ni tute ne parolis!...

*
* *

Mi konfesas, karulino,
Ke mi vidas tion ĉi:
Sur la tablo-multajn versojn,
En la versoj-multajn «ŝi».

*
* *

Oni legis en festprogramo de malgranda urbo:

«Per la eniro de S-ro Urbestro, la bestekspozicio estas malfermata».

## Logogrifo

| | |
|---|---|
| 1 2 3 4 5 6 7 8 | Frukto |
| 2 1 3 1 5 7 4 | Verbo |
| 5 3 1 2 3 8 | Insekto |
| 2 3 1 5 8 | Parto de l'korpo |
| 3 4 2 8 | Arbeto |
| 7 4 6 | Pronomo |
| 1 3 | Sufikso |
| 8 | Vokalo |

## Gravega alvoko

*Ĉiuj esperantistoj de la mondo estas insiste petataj afable helpi en la tuja kolektado de kompleta statistiko pri la disvastigo de la esperanta afero inter la «Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj».*

*Oni sendu respondon pri la jenaj demandoj:*

*1. La adreso de la Krist. Unuiĝo de Junaj Viroj?*

*2 Ĉu tiu ĉi unuiĝo iam por siaj membroj aranĝis paroladon pri Esperanto?*

*3 Ĉu la unuiĝo jam aranĝis Esperantan kurson?*

*4 Kiom da membroj entute studis Esperanton?*

*al S-ro Paul Hubner. Dellbrük apud Köln (Germanujo).*

## NEKROLOGIO

**S-ro W. T. Stead**

S-ro W T. Stead estis inter la pasaĝeroj de la ŝipego *Titanic*, kiam tiu ĉi pereis en Oceano. Kun multe da aliaj malfeliĉuloj li mortis.

S-ro Stead estis fervora apoganto de Esperanto. Li direktis la faman anglan revuon *Review of Reviews*, kiun li fondis en 1890.

Post lia vizito al Caro, en 1898, li paroladis por la paco kaj publikigis en 1899 verkon pri la. Unuigataj Ŝtatoj en Eŭropo.

Li verkis ankaŭ traktatojn pri la laborista movado, li sin okupis pri spiritismo kal al li oni ŝuldas la intervjuon, antaŭ unu jaro kaj duono, de la spirito de Gladstone, pri kiu intervjuo oni tre parolis en Anglujo. S-ro Stead estis 63-jara.

(*El "La Movado"*)

## Nia Konkurso

«Brazila Esperantisto» malfermas konkurson de traduko portugalen, en kiu povas partopreni ĉiuj esperantistoj lernantaj Esperanton de unu jaro, maksimume. La tradukoj estos ricevitaj ĝis la 30ª de Julio, kaj devas porti devizon aŭ pseŭdonimon, ripetitan sur fermita koverto enhavanta la nomon de la tradukinto kaj la kuponon trovitan sur la 3ªpaĝo de l'kovrilo.

Estos aljuĝita unu premio de 10$000 (6,66 Sm.), donacita de Dº Nuno Baena, al la lotemontrita konkuranto, el tiuj, kiuj atingos minimume dudek punktojn.

La juĝantaro voĉdonos por la fideleco de la traduko, stilo kaj gramatiko portugalaj.

*Post momento li diris mallaŭte:*

*—La steloj falas.*

*Klaro, ankaŭ mallaŭtigante senvole la voĉon, respondis:*

*—En aŭgusto ĉiam falas multe da steloj.*

*Kaj post momento ŝi aldonis:*

*—Oni diras, ke kiam stelo falas, oni devas antaŭ ĝia estingiĝo esprimi deziron kaj ĉi tiu deziro plenumiĝos... Jen, sinjoro, ankoraŭ unu falis!... Kaj tie! Kaj tie! Ili falas, kvazaŭ pluvo.*

*Rigardante la ĉielon, de kiu tie ĉi kaj tie falis oraj fajreroj kaj tuj estingiĝis en la subĉiela krepusko, li diris malrapide:*

*—Esprimu do deziron... la steloj falas amase kaj vi sukcesos eldiri ĝin, antaŭ ol ĉiuj estingiĝos*

*Klaro silentis; li turnis la kapon al ŝi. Ili sidis nun tiel proksime unu de l' alia, ke ŝi vidis klare la brilon de liaj okuloj.*

*—Pri kio vi petus la falantan stelon?*

*Penante paroli libere, ŝi respondis:*

*—Mi estas terura egoistino. Se mi kredus, ke la falantaj steloj plenumas la homajn dezirojn, mi petus senĉese: resaniĝu la patro, lernu diligente la infanoj kaj estu bonaj!...*

*—Kaj por vi? demandis li.*

*Granda estis la miro de Klaro.*

*—Por mi? Mia peto esprimus ja ĝuste mian varmegan deziron... mi do petus tiamaniere por mi mem. Kaj pri kio vi petus la falantan stelon?*

*Li komencis paroli meditplene:*

*—Mi petus la oran stelon pri la kredo, ke ekzistas sur la tero koroj bonaj, puraj kaj fidelaj; mi petus la stelon, ke tia koro apartenu al mi. Ora stelo, helpu min, faru, ke via tera fratino malaperigu la mallumajn sonĝojn, kiuj tiel ofte turmentas min!....*

## Kio estas Mateo?

Mateo estas higiena trinkaĵo, kiu anstataŭas profite la teon. Ĝi estas sub la kontrolo de la Internacia Ligo de la Pura Manĝaĵo kaj gajnis oran medalon ĉe la Internacia Ekspozicio de Manĝaĵoj, Paris 1910.

Nia samideano Ed. Struth. 22, rue de la Voûte, Paris (Francujo) sendos afranke, kun interesa broŝuro en esperanto pri Brazilio, specimenan paketon da Mateo nur por:

Fr. 0.60 (Francujo)
Fr. 0.75 (Alilando)

(El «*La Movado*»)

# KRONIKO

### BRAZILIO

**Sergipe.** — Je la 7ª kaj 6ª de Novembro, kaj la 5ª de Decembro, okazis en la urbo *Aracajú* ekzamenoj por *atesto pri lernado*, faritaj en la tieaj grupoj. La ekzamenintoj estas s-roj profesoroj aprobitaj d-ro Alcibiades Paes, Hemeterio de Gouvêa kaj Sebastião de Albuquerque.

Jen la nomoj de l' sukcesintaj geekzamenitoj: S-ino Consuelo Menezes Paes, f-inoj Veturia Lins, Maria P. Gouvêa e Silva, Josepha Vieira, Luiza Paes, Maria Augusta de G. e Silva, Ismenia Assis, Edith de Oliveira, Norma Reis, Sylvia de Oliveira Ribeiro, Aurora Monteiro da Rocha, Maria Augusta Paes; s-roj Clarindo Diniz Gonçalves, Arnauld Silva, Glafton Campos, Alfredo Aranha, Edison Lacerda, Nelson Sampaio, Julio Sampaio, Sebastião Barreto, Cicero Sampaio, Adherbal Figueiredo, Pedro Montalvão, Gildo Amado, Gentil Tavares da Motta, Alberto Azevedo, Vicente Mesquita, kaj Ulysses Soares de Mello.

Niajn korgratulojn al tiuj novaj batalantoj!

**Bahia.** —En *Alagoinhas* ricevis diplomon de *profesoro aprobita* s-ro Carlos Souza Cunha, nia fervora samideano.

— S-ro Magnus Söndahl, konata propagandisto, malfermis novan kurson en la ĉefurbo, kiu funkciadas ĉiutage en la sidejo de Inspectoria Agricola.—Estas elektita deputato Kolonelo Deraldo Dias, prezidanto de Esperantia Grupo de Bahia. Niajn korajn gratulojn!

**Espirito Santo.** — «Diario de Victoria» aperigis bonan artikolon pri nia afero.

**Rio de Janeiro.** —Alvenis el Eŭropo nia samideano d-ro Agenor Augusto de Miranda, kiu estis *oficiala delegito* de la Registaro de Brazilio en la 7-a int. kongreso de Antverpeno. — Foriris al Eŭropo nia klera samideano d-ro João Keating, vicprezidanto de B. L. E. *Bonan vojaĝon!* jen la vortoj, kiujn al li sendis la esperantistoj de Rio, per radiogramo. — La ĵurnalo «Echos de Inhaúma» aperigis artikolojn pri esperanto.—En la sidejo de Brazila Klubo nun okazas kunsidoj dufoje ĉiumonate por praktika interparolado de la novaj anoj.

—Medeiros e Albuquerque, nia klera konata samideano, nune en Eŭropo, ne forgesas la propagandon de nia lingvo: en «A Noticia» kaj «Imprensa» ni legis bonajn artikolojn por esperanto, de li verkitajn.

—Tial ke ĝenerala kunsido aprobis enmeton de artikolo en la statutojn de *Federação Espirita Brazileira* (plej grava Spiritista Asocio), laŭ kiu devas esti malfermita kurso de esperanto en ĝia sidejo, estas invitita por direkti la kurson nia samideano s-ro João Machado Tosta, kiu komencis la lecionojn je la 3-a de Majo. La kurso funkciadas marde kaj vendrede nokte. Jam enskribiĝis 39 gelernantoj. «O Reformador», oficiala organo de tiu Asocio, detale priparolas tion.— Je la 11-a de Aprilo, laŭ kutimo, okazis kuna vespermanĝo de esperantistoj en Rio, kaj oni pridiskutis la proksime okazontan kongreseton de U. E. A. en Brazilio.—Je la 14-a Aprilo d-ro Couto Fernandes malfermis alian kurson ĉe la grava Societo de Geografio de Rio de Janeiro.

—Berlitz School of Languages en Rio, decidis enkonduki esperanton inter la vivantajn lingvojn tie instruatajn. La kurso de esperanto estas tie direktata de d-ro Mello Souza.

**Paraná.**—Ni legis en «O Physiólatra» ke estas elektita delegito de U. E. A. en *Curityba* s-ro Luiz da Silva Bastos.

—Baldaŭ esperebIe fondiĝos la unua klubo esperantista en tiea ĉefurbo, kune kun kurso.

**S. Catharina.** - De s-ro Irineu A. Livramento ni ricevis sciigojn pri fondo de «Esperanta Klubo de Florianopolis,» je la 26-a de Aprilo. Jen ĝia provizora estraro:

Prezidanto—Irineu Livramento; Sekretario—Haroldo Calado; Kasisto—Augusto Montenegro. Antaŭen!

**M M.**

**Lernejo Carmen Sylva.**—*Rio de Janeiro*—Funkcias sub la direkto de D° Nuno Baena tiu ĉi lernejo, kies nomo estas respektego al Ŝia Moŝto Reĝina Elizabeto de Rumanujo La lernejo celas: 1. instrui Esperanton laŭ la metodo natura; 2. krei profesoraron por tia instruo; 3. konservi la Fundamenton de Esperanto. La instruado de Esperanto estas farita laŭ la jena programo: 1a parto-Lecionoj pri objektoj. Gradigita interligo de ideoj Gramatiko per ekzemploj. 2a parto-Lernado de instruo laŭ la metodo natura. Rememorigo de la 1a parto per la instruo al novaj lernantoj de la malnovaj. Plena gramatiko. Strukturo de la vortaro. Tradukoj esperanten kaj portugalen, uzante la vortojn portugalajn kiel eble plej malofte. Versofarado. Historio kaj literaturo Esperantaj. Dialogoj, bazitaj plej eble sur la Fundamento de Esperanto. La kurso funkcias kvar fojojn ĉiusemajne, en la Publika Lernejo sub la direkto de profesorino Guilhermina von Hoonholtz..

## PORTUGALUJO

**Movado en Lisabono.** — En la fino de la pasinta monato efektiviĝis la ĝenerala kunveno de la Lisabona grupo por bolatado de la estraro dum la jaro 1912 Jen la rezultato de tiu balotado:

Prez. — Leŭtenanto Acacio Lobo. Vicprez S-ro Rodolfo Horner. Sek. S-ro Duarte Rodrigues, kaj S-ro Eduardo dos Santos. kas S-ro Bandeira de Mello. —Leŭtenanto Acacio Lobo, profesoro de lingvoj kaj aŭtoro de portugala esperanta gramatiko, estas fervora esperantisto. Ĉiuj ĝojas pro lia elekto kiel prezidanto kaj dank' al li ni jam multe atingis koncerne la propagandon de Esperanto. Baldaŭ li malfermos kurson de Esperanto en unu el la Lisabonaj liceoj, por kiu li jam ricevis permeson de la registaro. Li ankaŭ intencas enkonduki nian lingvon en unu el la plej gravaj magazenoj de tiu-ĉi urbo kaj aperigi gvidlibron de portugala - esperanta konversacio.—S-ro Bemaldo daŭrigas la propagandon per la publikigado de bonaj artikoloj, el kiuj la lastaj estas «La Sporta fako de U. E. A.» kaj «Esperanto ĉe la policistaro!»

**Bemaldo**

# O Esperanto no estrangeiro

**Inglaterra**. — A Commissão de Instrucção de Sheffield introduzio o Esperanto na lista dos cursos para 1911-12.—Em 38 quarteirões de Londres funccionam cursos de Esperanto.

**Noruega**. — Reappareceu o «Norvega Esperantisto» como orgão official da «Norvega Esperantista Ligo».—Mlle. Bye abrio cursos de Esperanto na *Escola Official dos Cegos* e na *Associação Christã*, de Christiania. O conservador do Museu de Staranger publica um resumo em Esperanto dos artigos que apparecem no annuario do Museo.

**Polonia**. — A approximação do 8° Congresso Universal de Esperanto activa os progressos do movimento esperantista nessa região. Fundaram-se novos grupos na Cracovia.

**França**. — A *Sociedade Franceza para a propaganda do Esperanto* compõe-se actualmente de 10 Federações, 167 grupos e 8.385 membros. A importante associação «La Amikaro de Paris», fundada ha um anno, já conta mais de 1.500 membros. Funccionam actualmente em Lyon 14 cursos de Esperanto.—O Sr. André Michelin, conhecido fabricante de pneumaticos, offereceo ao grupo de Paris a importante somma de 20.000 francos para ser distribuida como premios aos alumnos de Esperanto na França. — As seguintes municipalidades votaram subvenções aos grupos esperantistas locaes: Avignon, Charenton, Chalon-sur-Seine, Le Creusot, Saint Dinis, Saint Maur, Roubaix, Rouen, Grenoble, Firminy, Saint Etienne, Annonay, Roanne e Saint-Omar. — Nas escolas communaes de Grenoble abriram-se diversos cursos de Esperanto, nos quaes inscreveram-se mais de 500 alumnos.

**Belgica**. — Falleceo o Dr. A. van der Biest-Anderlhof, presidente do 7° Congresso Universal de Esperanto.—Fundou-se em *Spa* um grupo com mais de 100 membros.—Abriram-se novos cursos em *Charleroi*, *Antuerpia* e *Spa*.

**Hollanda**. — Fundou-se o *Haga Esperantista Polic-grupo*, cujos membros reunem-se duas vezes por semana em uma sala cedida pelo prefeito de policia de Haya. — Já conta mais de 60 socios o «Katolikesperantistaj Laboristaj Klubo», recentemente fundado em Haya. — O conselho municipal de Haya resolveo que o Esperanto fosse ensinado officialmente em todas as escolas dessa cidade.

**Allemanha**. — O «Germana Esperantisto» aparece agora quinzenalmente, sendo uma das edições puramente litteraria. Parabens ao nosso illustre collega.—Convem recordar que a Allemanha, desde Janeiro de 1911, possue um jornal semanal, o «Germana Esperanto-Gazeto», que se edita em Magdeburgo.— E' digno de nota o movimento esperantista em München, que já conta 6 sociedades de propaganda. Funccionam actualmente 14 cursos frequentados por 323 alumnos. — Dresde possue agora uma bibliotheca real e um museo real de Esperanto, ambos administrados por um conservador real e installados nos edificios do Estado.

**Austria**. — Em Budapest prepara-se desde já a organisação do *3° Congresso Catholico Esperantista*, que terá lugar no mez de Agosto, dias antes do 8° Congresso Universal de Esperanto, a reunir-se em Cracovia.

**Italia**.— O movimento esperantista em Genova é bastante animador. Abriram-se 6 cursos nas escolas publicas, nos quaes matricularam-se 200 meninos.

O Sr. E. Privat fez uma conferencia na Universidade Popular, a qual assistiram mais de 400 pessoas. Elle visitou o rei da Italia e o Ministro da Instrucção Publica, que prometteram auxiliar a propaganda do Esperanto.

**Turquia Aziatica**. — No dia 9 de Março ultimo foi assassinado o Principe André Kopassis, regente da Ilha de Samos e presidente honorario da *Somosa Esperantista Societo*. Grandes serviços prestou esse illustre morto á propaganda do Esperanto, entre os quaes destacamos a sancção da lei votada pela Assembléa Geral. a qual tornou obrigatorio o ensino do Esperanto em todas as escolas da Ilha.

**Estados Unidos**. — A propaganda do Esperanto continua a ser feita activamente em muitas cidades dessa grande Republica por meio de festas, conferencias, cursos, passeios, etc.— O ministro superior da Instrucção Publica dos Estados Unidos aconselhou a todos os Estados que estudassem a questão do Esperanto, *lingua* viva auxiliar internacional, a unica que merece ser propagada—a vista das provas de vitalidade que tem dado.

**Ilha de Cuba**. — Durante o mez de Janeiro fundaram-se grupos em Cascajal e San Nicolas, sob a denominação de: «Bonaj Amikoj» e «Verda Stelo». — A propaganda continua activa em Cienfuegos e Cabañas.

**Chile**. — Tres importantes jornaes chilenos abriram, em suas columnas, uma rubrica constante sobre o movimento esperantista — Fundaram-se 2 grupos denominados «Verda Stelo» em Antofogasta e em Santiago.

**Australia**. — Realisou-se em fins de 1911 na cidade de Adelaide, com grande successo, o 1° Congresso Nacional de Esperanto, devendo o 2° Congresso realisar-se em Melbourne, em Novembro do corrente anno. Um dos resultados immediatos desse congresso foi a fundação da «*Aŭstralia Esperanta Asocio*».

A. C. F.

# NOVAJ GAZETOJ RICEVITAJ

**La Kulturo**. Gazeto de Bohema laboristaro esperantista en Aŭstrio. Oficiala organo de la Laborista Asocio-Esperantista en Praha. Hybernská ulice 7 (Lidovij Palác)—Praha. Bohemujo.

**Le Travaileur Esperantiste.** Organe de propagande espérantiste de la classe ouvriére. Jarabono 2 fr. 49, rue de Bertagne, Paris (3e). France.

**Okcident-Hungara Stelo** Oficiala organo de la Pozsonya Esp. grupo. Pozsony. Hungarujo. Abonjaro. Sm 1,20.

**Orienta Azio**. Ĉiumonata internacia gazeto. Redaktejo: Sekaigo-Ŝoin, Oŭsakimaĉi, Ebaragun, Tokio — Japanujo. Abonjaro: Sm 1,20.

# BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas :

**Kara Panjo.** Komedieto en unu akto, de Walter Gordon. El la angla lingvo tradukis Gego. Presa Esperantista Societo—Rue Lacépède, 33. Paris. Prezo : fr. 0,75.

**Vidaĵoj de Senlimo.** Originala traktato de Prof. Marcel Finot. N-ro 5ª el la 10. Spesdeka Biblioteko Esperantista. Esperanto, Propaganda Instituto. Kaiser-Wilhelm-Strato N° 15. Leipzig. Germanujo. Prezo 10 Sd.

**Portreto.** Rakonto de N. V. Gogol (1842). El la rusa lingvo tradukis Drº. Andreo Fiŝher. Presa Esperantista Societo. Rue Lacépède, 33. Paris. Prezo. fr. 1,25.

**Reponses a quelques objections**, de M Rollet de L'Isle. Pour les propagateurs de l'Esperanto. Esperantista Centra Oficejo. Rue de Clichy, 51. Paris.

**Signifo de akcioj societoj por la Esperanta movado.** de A. A. Saĥarov. Kun ruslingva aldono de modela projekto por regularo de akcia Societo Moskva Librejo "Esperanto", 26, Tverskaja. Moskvo. Rusujo. Prezo. 0.05 Sm.

**La popolsumigo en Aŭstrio en 1910**, de Jindrich Hantich. Eldonita de Bohema nacia konsilantaro en Praha en la reĝolando Bohemujo. Presejo de Emanuel Stivin en Praha. Aŭstrio.

**Katalogo de Moskva Librejo** "Esperanto" 4ª eldono. 26. Tverskaja Moskvo, Ruslando.

**Oficiala Jarlibro** de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista kaj adresaro de Bohemaj Korespondantoj. Biblioteko de Ĉasopis ĉeskych Esperantistu. Praha II. 2023. Dittrichova ul 7 Bohemujo. Prezo 40 hel.

**L'E'chec de la Délègacion** pour l'adoption d'une Langue auxiliaire internationale. Recueil de documents. Documents complémentaires kaj révélations postumes. Office Central Espérantiste. Rue de Clichy, 51, Paris.

**La plej bonaj spritaĵoj** el «Munĥenaj flugantaj folioj». Kolektitaj de H. Jost. Vend-jo: Esperanto. Propaganda Instituto Leipzig. Kaizer Wilhelm. str. 15. Prezo 60 Sd.

**Du Paroladoj**, de Edmond Privat. Barcelona 1909. Augsburg 1910. I. Vivanta lingvo de vivanta popolo. II. Pri la vivo de Esperanto. Kun antaŭparolo de Prof. Th. Cart. Prezo. fr. 0,25.

**Tri mortoj**, de Leo Tolstoj. Kun permeso de la rusa lingvo tradukis M. Sidlovskaja. Ĝi enhavas la portreton de Tolstoj. Prezo. fr. 0.50. Aĉeteblaj ĉe : Presa Esperantista Societo. Rue Lacépéde 33. Paris,

**Mazepa.** Tragedio en kvin aktoj. El la lingvo pola tradukis Antoni Grabowski. Librairie Hachette & C. Prezo 2 fr.

**Halka.** Opero en kvar aktoj. Muziko—Teksto de W. Wolsk. El la ligvo pola esperantigis Antoni Grabowski. Librairie Hachette & C. Prezo 1 fr.

**Vortaro** de la oficialaj radikoj *Esperanto* laŭ universala vortaro kaj unua oficiala aldono. E. Boirac. Librairie Hachette & C. Prezo : 0,25 fr.

**Raporto pri la Subkongreso de Esperanta Psikistaro.** Eldonata per la zorgoj de la Federacio Spiritista Belga-Anvers, 1911. Ĝi estas havebla senpage ĉe la sekretario Esperanta Psikistaro, rue Apelmans, 26, Anvers. Belgujo.

**Pri la Preparo de nova kaj pli plena eldono de Universala Vortaro** Raporto prezentita al la Lingva Komitato de ĝia ano, Snrº Horacio Huet. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

**Krestomatio por infanoj kaj komencantoj** Verkita en kunlaborado de diverslandaj esperantistoj sub redaktado de Romano Frenkel. Kolekto de Danubo Kajero unua. Editura "Esperanto". 5, Str. I. C. Bratianu. Bucaresti. Rumanujo. Prezo. fr. 0,40.

**Antaŭen kun kredo** ! Literatura jarlibro de «Pola Esperantisto» por 1911 jaro. Eldono de Jan Günther. Aĉetebla en administr. de «Pola Esperantisto», Varsovio, Hoza 20. Polonio. Prezo—1 Sm.

**El la domo tie kontraŭa** Skizo laŭ la vivo. Verkis Arnold Behrendt. Ricevebla de l'aktoro. Breslaŭ 16, Maxstr, 22 Germanujo Prezo 10 sd (1 resp. kupono).


## Novaj Esperantaj reklamiloj

*«Kontraŭ la piedŝvito»*, prospekto sendata de Dr-ro E. Capeder, Chur (Coire), Svisujo.

*«Kio estas Carmol»*—universala rimedo kontraŭ reŭmatismoj, artikaj doloroj, nerv-kaj kapdoloroj, k, t, p. Sin turni al S-ro A. H. Kretschman, Berlin—Rummelsburg, Markstr. 1, Germanujo.


## OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

51, rue de Clichy, Paris.

Jarabono... 5 fr

OFICIALA GAZETO, n-ro 42 (25 marto 1912). Tiu numero enhavas grandan kvanton da malnovaj kaj interesaj lingvaj respondoj de D-ro Zamenhof, represitaj laŭ la elvendita ĵurnalo "Esperantisto," kaj la lastajn komunikojn de la Loka Komitato pri la Oka Kongreso. Sub la rubriko "Centra Oficejo" la numero publikigas la Regularon definitive aprobitan de la Administra Komitato pri la fondo de Societo de Amikoj de Esperanto por la financa subteno de la Centra Oficejo. Oni trovas ankaŭ la tre gravajn regularojn starigitajn de la Administra Komitato pri la sendo de Rajtigitaj Delegitoj al la Oka Kongreso. Ĉiu societo aŭ grupo, kiu deziras esti oficiala reprezentata en tiu Kongreso devas nepre koni tiujn gravajn regularojn Sekvas la teksto de la diversaj cirkuleroj senditaj al la anoj de la Administra Komitato, kaj kiuj klarigas la alprenitajn decidojn. Sub la rubriko" Internaciaj Asocioj" oni trovas, interesan studon pri la Nomenklaturo de neorganika ĥemio, verkitan de scienca kaj teknika komisio de la Scienca Asocio. Poste venas la kutima raporto de la Tutmonda Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj, kiu enhavas interesan artikolon de S-ro J. Schroder pri la rajtoj de aŭtoroj en Aŭstrio. Tiu numero enhavas kompreneble la kutiman kajeron de la gravega Bibliografio de Esperanto.

## Korespondado

S-RO ADOLF WINKLER—Görlitz (*Germanujo*) deziras interŝanĝadon de ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj geesperantistoj Li ĉiam respondos.

S-RO RUDOLF NEMÓTA, banka oficisto (*Austria*—Krakov - Rynch 42) deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartojn kaj interŝanĝi poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Ĉiam kaj tuj respondon.

BRAULIO DE MORAES, rua Bento Gonçalves, 50, Engenho de Dentro, Rio de Janeiro, *Brazilio*, deziras korespondadi per ilustr poŝtkartoj.

S-RO JR. POKORNY, banka oficisto, Rynekgtowny 42, Cracovie, *Autriche-Hungrie*, deziras korespondadi per ilustritaj p. k kaj interŝanĝi p. m. el ĉiuj landoj. Ĉiam kaj tuj respondos. Korespondas esperante, france, germane.

S-RO GIOVANI LEONI, rua Alfandega, 93, Rio de Janeiro, Brazilio, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.

LUIZ FIGUEIREDO FILHO, estrada da Freguezia, 50 A Jacarepaguá, Rio de Janeiro, Brazilio, interŝanĝas poŝtmarkojn.

**Ernst Kaufmann, Wien IV** (Austrio) **Grosse Neugasse 44 Tür 20,** deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun samideanoj aliaj landoj. Enskribitaj unuaj sendaĵoj estas dezirataj. Respondo kaj marksendaĵo tuj kaj ĉiam.

Kelkaj esperantistoj deziras interŝanĝi leterojn, ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Oni turnu sin al: Sro **Hermann Regen, Elberfeld** (Germanujo) **Kielerstr. 6**. Respondos ĉiam tuj.

**THEODOR ANDIUG**

**Berlin S. W. 340 Blücherstr. 33**

Kolektas anoncojn por ĉiu ajn gazeto. Speciale por la **kongreslibro de la VIII a Universala Kongreso de Esperanto..... Krakaŭ 1912.**

**EKSPORTOFICEJO**

Solvendado de industriaĵoj kaj esperantaĵoj en ĉiu ajn lando kaj dum naciaj aŭ internaciaj kongresoj.

Oni postulu informojn kaj prospektojn kontraŭ respondkupono.

KONKURSO

—DE—

**"BRAZILA ESPERANTISTO"**

Mi certigas, ke........

.................................

lernas Esperanton de unu jaro. (Subskribo de la profesoro aŭ konata esperantisto)

**Belega verko por donacoj kaj premioj**

estas la ĵus aperinta arta kajero

**ALBRECHT DÜRER**

Lia vivo kaj elekto el liaj verkoj.
Kun klarigoj de la apartaj folioj.
eldonita de D-ro Friedrich Nüchter.
Esperantigita de la Germana Esperanto-Asocio.

**Prezo nur 2 Sm. — lukse bindita 2 1/2 Sm.**

La belega kajero, formato en folio, enhavas 95 paĝojn: Tekston, 54 tabulojn kaj bildojn (13 pentraĵojn de Dürer, 12 mandesegnaĵojn, 16 kupro-gravuraĵojn, 1 koloran presaĵon).

Certe neniu aperaĵo de la esperanta literaturo pli meritas trovi lokon en la biblioteko de ĉiu esperantisto ol ĝuste tiu-ĉi verko.

La teksto de l'originalo estas modele tradukita, kaj la plej bonaj verkoj de Dürer estas perfekte reproduktitaj grandaparte en laŭoriginala grandeco.

La prezo estas ekstreme malalta rilate al la riĉega enhavo.

Detalajn prospektojn senpage kaj afrankite.

Ĉe mendoj je minimume 5 ekz, la livero okazas afrankite.

Plue aperis:

**La organizado de la intelekta laboro per la Ponto.**

de **K. W. Bührer** kaj **A. Saager**
redigita de **F. Schmid, Bern,**

Prezo bindita 2 Sm.

**Eldonejo:** *Librejo Fr. Seybold,*

**ANSBACH 5**

**(Bavarujo).**

## TARIFO POR ANONCOJ

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | Paĝo Sm. | 15. | 20$000 |
| 1/2 | | 8. | 12$000 |
| 1/4 | » | 5. | 7$500 |
| 1/8 | » | 3 | 4$000 |

Por 2 foja anoncado rabato da 15 %
Por 3 » » » 20 %
Por 6 » 30 %

## OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

Organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj

Jara abono. 5 fr.

Aperas ĉiumonate, krom en Septembro.

Ĉiuj esperantistoj devas ĝin aboni.

Redakcio kaj administracio, 51 rue de Clichy, Paris.

STANDARD

**UNDERGROUND CABLE Co.**

Pittsburgh, PA. U. S. A.

FABRIKISTOJ DE

## Nudaj Kaj Izolitaj Fadenoj Kaj Kabloj

por ĉiaj Elektraj Uzoj.

Ĉiaj Nudaj kaj Izolitaj Fadenoj.
Ciaj Kabloj por Elektra Lumo kaj Forto.
Ĉiaj Telefonaj kaj Telegrafaj Kabloj.
Ciaj *Fajravertaj kaj Signalaj* Kabloj.

## Akcesoraĵoj - Apartenaĵoj por Kabloj.

Materialoj por Kunigado
Ujoj por Kunigado
Ujoj por Kablofinoj

SKRIBU AL NI

# Vortaro Esperanta Portugala

**KOMPILITA DE TOBIAS R. LEITE**

Um volume in 16, 176 paĝa....... 1$500
Aĉetebla ĉe
*Francisco Alves & C.*
166, rua do Ouvidor.— Rio de Janeiro.
— Kaj ĉe ĉiuj eldonistoj de «La Revuo».

## LINGVO INTERNACIA

Monata Centra Organo de la Esperantistoj nur en Esperanto
(48 p. 13 X 20)
Jara abono 5 fr. (2 Sm)
Administracio: Presa Esperantista Societo.
33, rue Lacépède, Paris.

## LA REVUO

Internacia literatura Gazeto. Kun la konstanta kunlaborado de Dro. Zamenhof.
Jara abono 7 fr.
Redakcio kaj Admistracio ĉe Librejo Hachette & C, 79, Boulevard S. Germain. Paris.

## DR° JOSÉ ARTHUR BOITEUX

**ADVOKATO**

**Strato Hospicio, 24**

*RIO DE JANEIRO*


## LIVROS

Na séde do Brazila Klubo, á Avenida Rio Branco n. 153, 2°. Andar, encontram-se á venda os seguintes livros:

*Brazilio*. Parolado de Sr. E. Backhenser 1$000
*Methodo theorico e pratico do esperanto* por Honorio Rivereto.. ................. 1$000
*Lina*, comedia, por Pedro A. Coutinho.. 1$000
*Esperanto*. Conferencia do Dr. Antonio de Arruda Beltrão......................... $500
*Karlo*, facila legolibro, de Privat....... $500
*Parizina*, poemo de Byron, esperantigita de Dr. Venancio da Silva............ 1$000
Ha tambem cartões postaes de propaganda, pelo preço de 50 rs. cada um, ou 600 rs. e 800 a duzia

**Livros em Esperanto**

Acham-se á venda na Livraria de Jacintho Silva á rua Rodrigo Silva n. 7, numerosos livros em esperanto.
Peçam catalogos.